


HORIZONTO

*KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA NEUTRALA ESPERANTO-MOVADO*

**6-a Jaro N-ro 32 (2)
Marto – Aprilo 1981**



PRI LA NUNA STATO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN U.S.S.R.

ANKAŬ SAT-ANO AVERTAS...

LA MISPREZENTOJ DE "STARTO"

NOVA RUBRIKO: EL NIAJ ORGANIZAĴOJ

HORIZONTO

KULTURA KAJ INFORMA REVUO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO



Dumonata oficiala organo de la INTERNACIA
CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-
MOVADO (ICNEM)

Eldonata kaj presata de
ELDONEJO PERSPEKTIVO

Ĉefredaktoro: *Jean Thierry*,
5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio.

Redaktoro: *H.V. Rasmussen*,
Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

Ĉiujn artikolojn kaj aliajn kontribuojn por la
revuo bonvolu sendi *nepre* al la ĉefredaktoro.
La redakcio rezervas la rajton mallongigi la
tekstojn kaj korekti la lingvon.

Abonojn akceptas la perantoj de HORIZONTO
aŭ rekte la ELDONEJO PERSPEKTIVO,
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio.
Postĉekkonto: Kopenhago 9 32 95 95.

Jara abono por ĉiuj landoj: 100 danaj kronoj
aŭ ronda egalvaloro. Tiu abono ne inkluzivas
membrecon de ICNEM. Vidu la antaŭlastan
kovrilpaĝon.

Por *recenzo* bonvolu sendi 2 ekzemplerojn, por
mencio 1 ekzempleron de libro aŭ broŝuro.

HORIZONTO akceptas ankaŭ *anoncojn*
laŭ la suba tarifo:

1/1 pago 200 dkr., 1/2 pago 100 dkr. kaj
1/4 pago 50 dkr.

ENHAVO

"Pax tecum!" (Jean Thierry)	25
Denove pri nia revuo (H.V. Rasmussen)	26
Pri la nuna stato de la Esperanto-Movado en U.S.S.R.	27
Ankaŭ SAT-ano avertas . . .	32
Tra la Gazetaro (Jean Thierry)	33
Esploro kaj Dokumentado (Ivo Lapenna)	35
Libroj sub la Lupeo (R. Schulz)	40
La misprezentoj de "Starto" (Jean Thierry)	41
Demento de pliaj mensogoj (Ivo Lapenna)	42
Forpasis D-ro Georges Salan	43
El niaj Organizaĵoj	44

Lingva Angulo	45
Esperanto en Radio	46
La 7-a Internacia Konferenco de NEM	47
Kotizoj kaj Pagmanieroj (H.V. Rasmussen)	48

PERANTOJ

Aŭstrio:

D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz.
Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 230 ŝil.

Britio:

Geoffrey King, 12 Elmer Close, Enfield Mid-
dlesex EN2 7EZ. Pĉk. 37.507.9106. Jarabono:
7 anglaj pundoj.

Danlando:

Presejo *Perspektivo*, Nørregårdsvej 91,
DK- Rødovre, Pĉk. 9 32 95 95. Jarabono:
100 d.kr.

Francio:

André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle,
F- 75018 Paris. Pĉk. Paris 21.670.96 V.
Jarabono: 75 ffr.

FR Germanio:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773
Möhnesee-Gunne. Konto Nr. 31 377 450
Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85).
Jarabono: 33 DM.

Greĥio:

Adda Sakellaroupoulou, Sokratous 88, Omo-
nia, Ateno 101. Jarabono: 380 dr.

Hispanio:

Luis Hernández-Yzal, D-ro Zamenhof St. 12,
San Pablo de Ordal (Barcelona). Jarabono:
600 pesetoj.

Israelo:

Ben-Alter Jehiel, P.O.B. 379, Petah Tikva. Pĉk.
Bank Hadoar, 4-45854-8. Jarabono: 120 she-
kel.

Jugoslavio:

Prof. D-ro Oton Pancer, Voĉarsko Naselje 10,
Yu-41000 Zagreb. Jarabono: 200 n.din.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. Toronto Ont.
M4S 2V2. Jarabono: 20 dol.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L-Olm. Pĉk.
54175-49. Jarabono: 540 lfr.

Nederlando:

Marianne Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70, I.R.
3015 BC Rotterdam. Jarabono: 36 n.gld.

El tiuj landoj oni pagu al la Administracio aŭ al
unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando
estos trovita.

GRAVA RIMARKO: Oni akceptas abonojn
nur por la tuta kalendara jaro.

Prof. D-ro IVO LAPENNA

PREZIDANTO

**INTERNACIA CENTRO
de la
NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO**



(Foto: Kehlet)

Unu el la celoj de la INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO estas manifesti la kulturajn kaj ĝenerale ideojn valorojn de la sendependa, partipolitike kaj religie neŭtrala Esperanto-Movado.

"PAX TECUM!"

"*La paco estu kun ci*" estis saluto de la unuaj kristanoj en tempo de gravaj ĉiuspekaj malordoj . . . La paco estis ankaŭ ĉe d-ro L.L. Zamenhof unu el la esencaj motivoj, kiuj en tempo de pogromoj kaj militfontoj instigis lin estigi la Lingvon Internacian.

Sed alvoki pacon neniam celis prisilenti pravajn argumentojn inter homoj almenaŭ liberaj kaj liberamaj, kiaj decas esti veraj esperantistoj. Jam de 1974 tro ofte en la movado multaj bedaŭrinde uzadas tian alvokon kiel artifikon por eviti la plej etan diskuton pri esencaj problemoj de la Universala Esperanto-Asocio: "*Estu paco . . . restu paco inter gesamideanoj!*" Kaj tiel konkure ili deturnas la okulojn for de la esenco, blindigante sin mem eĉ ĝis tia grado, ke kelkaj kuraĝas deklari: "*Mi ne volas esti informita!*"

Aliflanke bona esperantisto antaŭ nelonge — por dronigi la fiŝon kaj fuĝi de l'temo kvazaŭ de danĝero — ne hezitis skribi en letero: "*Ankaŭ min MIREGIS Lapenna dum mia unua Universala Kongreso (La Sorbonne: 1950) . . . Jam je tiu epoko mi eltrovis, ke tiu kiu posedas elokventarton, tiu ĉiam pravas. Multaj eventoj en mia vivo instigis min 'gardi la kapon malvarma', kiel asertas franca proverbo, antaŭ tiuj, kiuj posedas Elokventarton!*" Tiel! kvazaŭ elokventarto estus per si mem pereiga peko aŭ malsano por la vero!

Nu, prisilentado neniam servis al paco, kaj jen kio estas unu plia pravo de ekzisto por HORIZONTO!

Jean Thierry
redaktoro

DENOVE PRI NIA REVUO

La redakcio de *Horizonto* dankas al la legantoj, kiuj konigis al ni sian opinion pri la revuo en la nova formo. La plej multaj esprimis laŭdojn, trovante la ŝanĝitan aspekton plaĉa. Pro tio ni dankas ankaŭ la kunlaborantojn de Eldonejo Perspektivo, kiuj vere laboregis por krei tiun rezulton. Ili devis lerni la novan teknikon, kaj ili laboris eĉ kelkajn tutajn noktojn por ebligi kiel eble plej fruan aperon de la revuo, ĉar la plano estas, ke ĝi estu liverita al la poŝto la unuan tagon de ĉiu nepara monato (januaro, marto k.t.p.).

La kunlaborantoj meritas dankon ne nur pro sia laboremo, sed ankaŭ pro sia zorgemo. La du estas interligitaj, ĉar la amplekso de ilia laboro dependas de ilia malŝato al kompromisoj koncerne estetikajn postulojn. Ni tial povas atendi ankoraŭ pli belajn numerojn estonte. Estas vere, ke *Horizonto* ne estas plu tiel luksa kiel dum la zaragoza tempo. Tion necesigis la ekonomiaj cirkonstancoj. Ĉiam plialtiĝas la salajroj, prezoj de papero kaj de aliaj materialoj same kiel la sendkostoj. Tial ni devis fari la ŝanĝon por ebligi la pluan eldonadon de nia revuo, la laŭtparolilo de sendependa neŭtraleco kaj sentinelo de ties principoj.

Kelkaj - tre malmultaj - kritikis la plialtigitan abonprezon. Al tiuj necesas atentigi, ke ĝis nun *Horizonto* ne povis esti eldonata sole surbaze de la abonpagoj. La revuo ricevis neniajn subvenciojn krom donacojn de la legantoj, kiel oni povis rimarki per la donacolistoj publikigitaj de tempo al tempo en la revuo. Partoprenintoj de la Internaciaj Konferencoj de NEM memoras, ke tie oni aranĝis monkolektojn, librovendadon k.a. por havigi al *Horizonto* la necesajn rimedojn. Estas malagrabla devi peti la abonantojn pri donacoj, kaj verŝajne la abonantoj siaflanke ne tro ŝatis tiajn instigojn, post kiam ili pagis la fiksitajn abonpagojn. Tion ICNEM volas eviti: Ne plu petoj pri donacoj por *Horizonto*! La ekonomia bazo por tio estas espereble kreita per la nova produktometodo uzanta malpli kostajn materialojn, la senpagan laborforton de grupo da personoj kaj - almenaŭ provizore - senpagan uzon de la por tiu celo aĉetitaj maŝinoj de Eldonejo Perspektivo.

(Daŭrigo sur p. 46)

☆ ☆ ☆

Noto de la redakcio: Antaŭ nelonge la redakcio ricevis la supran raporton de konata esperantisto pri la nuna stato de la Esperanto-Movado en Soveta Unio. Ĝi konfirmas plurajn aliajn informojn, kiujn ni ricevis el diversaj lokoj de tiu lando. El vidpunkto de *Horizonto* kuraĝigaj estas la vortoj en la lasta alineo. N.E.M. ĉiam fidis, ke ankaŭ en Soveta Unio troviĝas multaj sinceraj esperantistoj, kiuj "volas havi siajn rajtojn, unue la rajton de libera propagando de siaj ideoj, rajton labori en kaj por Esperanto, rajton libere kolekti kaj aliajn rajtojn de ĉiu libera homo". Supre estas presita la kompleta raporto, kiu ne bezonas komenton. Pro kompreneblaj kaŭzoj la nomo de la raportinto estas ellasita, sed la redakcio garantias la aŭtentikecon de la teksto. Nur la subtitoloj estas aldonitaj por faciligi la legadon.

Kion vi ne legos aliloke

PRI LA NUNA STATO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN U.S.S.R.



Iom da Historio

Tiuj personoj, kiuj interesiĝas pri la Esperanto-movado en Sovetunio sciigas, ke dum la dudekaj-komence de la tridekaj jaroj en Sovetunio floris la Esperanto-movado: estis eldonataj Esperanto-revuoj, libroj, poŝtaĵoj (poŝtmarkoj, poŝtkartoj, afrankitaj kovertoj kun Esperantaj tekstoj), radiostacioj de kelkaj urboj disaŭdigis Esperante.

Sed fine de la tridekaj jaroj preskaŭ ĉiujn aktivajn esperantistojn de Sovetunio trafis aŭ prizonoj aŭ Siberiaj koncentrejoj, aŭ ili simple senespere malaperis post akuzoj pri spionado aŭ post similaj ridindaj akuzoj. Tio signifis faktan malaperon de la Esperanto-movado en la tuta lando. Kaj tiu stagno regis dum preskaŭ dudek jaroj, t.e. dum la tuta regado de J. Stalin, kaj ankoraŭ dum kelkaj jaroj post lia morto.

Fine de la kvindekaj jaroj, dum la preparado al Internacia Festivalo de Junularo kaj Studentaro en Moskvo, la nova, veninta post J. St., soveta registaro eksciis, ke al la festivalo venos multaj esperantistoj el diversaj landoj. Kaj por montri procedon de kresko de demokratio, ekkomencita post la morto de la gravulo, estis urĝe serĉataj kaj finfine trovitaj nemultaj restintaj vivaj malnovaj esperantistoj, al kiuj estis ordonite fondi Esperanto-kursojn kaj komenci instrui la lingvon. Estis eldonitaj tiutempe eĉ ne lerno-libroj, sed pli precize informlibretoj pri Esperanto-gramatiko kun etaj vortaroj.

En la ĉebaltaj respublikoj (Estonio, Latvio, Litovio), kiuj estis aligitaj al USSR somere de la 1940-a jaro, la perdoj de la Esperanto-movado estis kompare negrandaj, kaj en ili renoviĝis la fortoj de la Movado. Ĝis nun ili tenas prioritaton en la Esperanto-movado de USSR. Ili la unuaj sukcesis organizi fine de la kvindekaj jaroj tiel nomatajn "Ĉebaltajn Esperantistajn Tendarojn" (ĈET), poste alinomitaj "Baltaj Esperantistaj Tendaroj" (BET), kiuj okazas ĉiusomere ĝis nun, kaj kiuj estas fakte tutsovetiaj. Iom poste komenciĝis SEJT'oj - Sovetiaj Esperantistaj Junularaj Tendaroj. En tiuj respublikoj foje-de-foje aperadas nacilingvaj lernolibroj de Esperanto (lastfoje - en Latvio en 1979), dum en aliaj respublikoj post la komenco de la 60-aj jaroj la lernolibroj ne aperadis, inkluzive duonoficialan eldonon de la lernolibro de B.G.Kolker. En Tallinn (Estonio) aperadas ankaŭ tradukoj de estona literaturo.

La mezo de la 60-aj jaroj estas grava punkto de la Sovetia Esperanto-movado - tiutempe komencis sian laboron SEJM - Soveta Esperantista Junulara Movado, kiu estis formo de kunlaborado de Esperanto-klubo, kaj kiu malgraŭ sia neĵura stato estas farinta multe por disvastigo de Esperanto. Ĝuste tiam komenciĝis amasaj Sovetiaj Esperantistaj Junularaj Tendaroj, iom-po-iom la sovetia gazetaro komencis aperigi artikolojn, sciigojn pri la lingvo, movado, komenciĝas regionaj, lokaj tradiciaj renkontiĝoj de Esperantistoj. SEJM komencis eldonadi (duonoficiale) la probleman gazeton "Aktuale", ekspres-informleteron "Kurte", kiuj firmigis interligojn de esperantistoj de Sovetunio.

Fondo de ASE: Perfiditaj Esperoj

Sed mia rakonto fakte ne estas skizo de la historio, ĝi celas rakonti pri la nuna situacio de la Sovetia Esperanto-Movado, kaj la antaŭa mallonga skizo estas nur malgranda bazo por pli bona kompreno de la nuna situacio.

Kiam klariĝis, ke la Esperanto-movado en USSR fariĝis jam rimarkebla forto, la sovetiaj komunistpartiaj komsomolaj, sindikataj gravuloj, estraro de Societo de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando, rigardante tiun bone kunligitan, organizitan, havantan fortajn ligojn kun eksterlando parton de Sovetia civitanaro, decidis "cele al ordigo de la enlanda Esperanto-movado kaj ĝiaj internaciaj ligoj" krei Asocion de Sovetaj Esperantistoj, kio tre ĝojigis la aktivularon de la movado, multaj atendis la kreon de ASE - faktan oficialiĝon, longe laboris por tio, esperante, ke en "la novaj kondiĉoj" eblos agi oficiale, esperante ke post la oficialiĝo malaperos malfacilaĵoj, ligitaj kun ekhavo de normalaj kluboj, organizado de amasaj kursoj, - ja en multaj urboj Esperanto-klubo "loĝas" en ĉambroj, kie krom ili funkcias diversaj aliaj grupoj - de muzikaj ĝis pentroartaj kaj teatroŝatantoj, kaj kie ne eblas ofte eĉ pendiĝi anonctabulon kaj murgazeton. Multaj esperantistoj esperis, ke eblos dum "la

tempoj de ASE" organizi kaj partopreni diversajn internaciajn Esperantistajn renkontiĝojn kaj tendarojn, kaj ne nur enlandajn. Sed, la afero rilate la klubojn ne pasiĝis antaŭen. kaj eĉ enlandaj tendaroj kaj renkontiĝoj anstataŭ helpo sentas kontraŭstaron - eĉ de ASE! Ekzemple la pasintjara tendaron apud Kievo (laŭ la sciigoj de kievanoj - organizintoj de la tendaro) oni permesis en la lasta momento, kelkajn tagojn antaŭ la alveno de ĝiaj partoprenantoj, kvankam la permeso estis petata dum duonjaro. Ĉi-jaran tendaron apud Ivanovo rajtas partopreni (laŭ la permeso de ASE) 200 esperantistoj, dum ĝin volis partopreni 300-350 esperantistoj (proksimume tiu kvanto da esperantistoj estis pasintjare en Kieva tendaro, kiu interalie bonege sukcesis). La tendaro apud Ufa, kiu devas okazi ĉi-somere, fiaskis nekomencite - lokaj instancoj, ne havante permeson el Moskvo (kiu estas bezonata, ĉar la tendaro estas tutsovetia aranĝo), sed nur "laŭ via bontrovo" ne ekvolis riski, kaj la tendaro estis malpermesita. Kaj anstataŭ kutimaj 15 tagoj de la tendara tempo, en Kieva tendaro esperantistoj havis lo tagojn, en Ivanovo - 3 tagojn... Kiom da tagoj estos estonte? Multaj kredis, ke eblas pli facile akiradi eksterlandan Esperanto-literaturon, periodaĵojn, sed ĝis nun akiri la literaturon kaj aboni pli kaj pli limigitan kvanton da periodaĵoj eblas nur per personaj kontaktaj.

Estis ĉesigita (aŭ malpermesita?) eldonado de "Aktuale", "Kurte", kaj multaj sovetiaj esperantistoj restis sen informado, des pli ke la bulteno de ASE estas dissendata nur po unu ekzemplero por ĉiu klubo, sed ne por ĉiu membro. Estis espero, ke la centra sovetia kaj la loka gazetaro post la kreo de ASE pli aktive informos la popolon pri Esperanto kaj la Esperanto-movado. Sed - stranga fakto - la kvanto da artikoloj pri Esperanto en la gazetaro malpli-grandiĝis, kaj eĉ kelkaj ĵurnaloj, en kiuj antaŭe aperadis informoj pri Esperanto, ne plu volas preni ilin. En unu el la redakcioj estis rekte dirite: "La redaktoro vizitis suprajn partiajn (komunistajn) instancojn, kaj tie oni malpermesis al li aperigi pri Esperanto". Nun ni tenas en la manoj unu ĵurnalon, sur la lasta paĝo de kiu estas foto, farita dum antaŭ-nelonga renkontiĝo de esperantista junularo en Karpata Montaro. En mallonga teksto sub la foto estas eĉ ne unu vorto pri Esperanto: simple kolektiĝis junularo. La aŭtoro skribis al mi kun ofendo: "Ili forstrekis ĉion!!! La ĉefa senco estis ĝuste tie!"

Estas normale, ke novfondita socia organizaĵo alprenu ĉion pozitivan el

☆ ☆ ☆

HORIZONTO estas aŭde legata en la landoj kun totalismaj reĝimoj.
 Pagu la abonojn por amik/in/o en kiu ajn el tiuj landoj,
 kaj la administracio prizorgos, ke ĝi atingu lin/ŝin.

heredaĵo de siaj praorganizaĵoj. Tiel devus esti ankaŭ rilate al ASE, kiu devus heredi ĉion plej bonan de SEJM, unue - demokratecon. Sed jam tio, kiel okazis preparo por la fondo de ASE (sekretoj, malkonfido al Esperanto-aktivularo, eĉ tio, ke la projekto de la statuto de ASE la homoj ekvidis nur dum la Fonda Kunveno, je kelkaj horoj antaŭ la voĉdonado) devus sobriigi multajn. Sed multaj esperantistoj atendis la fondon tre longe, kaj per ĉiuj fortoj penis proksimigi tiun momenton, kaj... SEJM-aktivuloj, inspiritaj kaj trompitaĵoj de la festena atmosfero de la fonda kunveno, tuj malfondis SEJM-on (kvazaŭ por doni "verdan vojon" al ASE). Tiel malaperis grava socia forto, kiu povus instigi la Asocion agi aktive, malaperis "konkuranta firmao".

Unu Jaro Jam Pasis

Pasis jam pli ol unu jaro post la fondo de ASE. Dum tiu tempo evidentiĝis, ke ASE fakte nenion faras por la interesoj de Esperanto-klubo, Esperanto-movado en Sovetio. Rimarkeblas, ke la Asocio eĉ bremsas tiujn personojn, kiuj volas ion fari. Kiom da leteroj estas senditaj al Moskvo (al ASE) kun proponoj de helpo, kunlaboro, proponoj de plibonigo de la agado. Sed la sendintoj aŭ entute ne ricevadas respondojn, aŭ respondojn de la tipo: "La estraro estas okupita de aliaj pli gravaj problemoj". Interese, de kiuj? Neniu ion scias. Pli ol unu jaron la kluboj atendis "Proksimuman statuton de Esperanto-klubo". Naŭ monatojn la kluboj atendis la unuan informbultenon de ASE kun materialoj pri la fonda kunveno, kiu devis aperi dum semajno post la kunveno. Kaj ĝi aperis... en la rusa lingvo! Pli ol jaron esperantistoj atendas aperon de sovetia Esperanto revuo, kaj jam videblas, ke ili longe atendas. Pri kio do dum tiu longa tempo okupiĝas ASE? Fakte ne estas rimarkebla ĝia pozitiva laboro (almenaŭ sur la kluba nivelo). De la estraro de ASE eĉ estas dissendita letero al la lokaj instancoj, kie estis skribite krom alia: "Ne zorgu pri kresko de la kvanto da esperantistoj, zorgu pri kresko de ilia lingva kaj ideologia kvalito". Nu, zorgi pri la lingva kvalito - tio estas bonega afero, sed "ideologia kresko" tio estas en nunaj kondiĉoj de la sovetia Esperanto-movado ŝanĝo de neŭtraleco de la movado per ideoj de komunismo. Kial do sovetia esperantisto devas propagandi komunismon al homo, kiu ne volas esti propagandita, ekzemple, al esperantisto-katoliko, aĉvortumante liajn/ŝiajn ideojn. Sed se la sovetiano volas simple korespondi kun li/ŝi pri la vivo, literaturo, interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, etikedojn de alumetskatoletoj? Kaj ĉu "ne zorgu pri kresko de la kvanto da esperantistoj" ne signifas forgeson aŭ neglekton de unu el plej gravaj postuloj de la Esperanto-movado: "Ĉiu homo posedu sian gepatran lingvon kaj la duan - internacian"? Esperantistoj devas zorgi pri pligrandiĝo

de siaj vicoj, almenaŭ por montri, ke la neŭtrala internacia lingvo povas esti uzata same kiel iu nacia, samkvalite.

Ĉi-supre kelkfoje estis menciita la estraro de ASE. Sed la termino "estraro" estis menciita ne tre ĝuste. Nun kreiĝis interesa situacio en ASE, kiam la estraro nenion valoras, kiam decidas eĉ ne Prezidio (en sia plena konsisto!) sed sekretario de la estraro, homo, kiu preskaŭ ne scipovas paroli Esperanton, kiun oni devigis ellerni la lingvon, mal-esperantisto en la animo, k-do A.Berjoza. Jen kiu historio okazis dum la Fonda Kunveno de ASE: Kiam estis farita propono elekti k-don A.Berjoza en la estraron, ekstaris unu estimata kaj eminenta esperantisto kaj diris: "Mi kontraŭas, ĉar mi scias, kiel laboris tiu k-do en la komisiono de internaciaj ligoj de esperantistoj" (informo: la komisiono estis kreita en 1962). Tuj post la vortoj ekstaris pli eminenta kunlaboranto de Societo de Amikeco kaj Kulturligoj kun Eksterlando (organizacio - kunkreinto de ASE, en kiu laboras k-do A.Berjoza), kaj li diris: "Mi certigas vin, ke k-do A. Berjoza komprenis siajn antaŭajn erarojn, kaj li laboras kiel decas". Sed kiel jam estas antaŭe dirite - multaj leteroj estas neresponditaj, ktp.

Neesperantistoj-Partianoj Decidas

Eĉ la membroj de la ASE-prezidentaro faras fakte nenion, eĉ ne sciante, kion ili devas fari. Ili mem sendas senreeĥajn proponojn al Moskvo (multaj el ili estas ne-moskvanoj). Kelkaj el ili petis eĉ persone la prezidanton de ASE, k-don M. Isajev, kaj la sekretario, k-don A. Berjoza, konstante sendadi al ili oficialajn invitojn por kunsidoj de la prezidentaro, sed - kiel vi, kara leganto, povas kompreni - ili ne ricevas respondojn, kaj ne povas partopreni la kunsidojn, ĉar ĝis nun neniu aŭdis ion pri la kunsidoj. Tion mi diris pri la membroj de la Prezidio - *esperantistoj*. Krom ili en la Prezidio, en la estraro de ASE, de la respublikaj filioj preskaŭ duono estas homoj, kiuj eĉ du vortojn ne povas kunligi Esperante, ĉar ili ne scias tiujn vortojn Esperante. Sed dum la Fonda Kunveno oni "petis" - eĉ preskaŭ devigis voĉdoni por tiuj homoj. Kiuj estas tiuj homoj! La partiaj, komsomolaj, sindikataj funkciuloj, funkciuloj el jam menciita Societo de Amikeco, kiuj nur kontrolas la Sovetian Esperanto-movadon kaj "stirigas" ĝin, kien por ili estas bezonate. Antaŭ nelonge oni eksciis, ke jam neesperantisto estas redaktoro de Sovetia Esperanto-revo. Do, kie estas SEJM, kies gvidantoj ĉiuj estis esperantistoj?!

Kaj ĉu vi rimarkis (se ne - rimarku), kiu el la sovetiaj esperantistoj vojaĝas eksterlanden, ekzemple, al Universalaj Kongresoj? Tiuj, kiuj "stiras" kaj preskaŭ ĉiam la samaj homoj. Tiuj ASE-gravuloj neniam rifuzos siajn postenojn, ĉar ili havas profiton - ĉiujare (eĉ kelkfoje dum la jaro) vojaĝi ekster-

landen. Ĉu aliaj geesperantistoj de SU estas malpli indaj? Kial do ne povas veni al Universala Kongreso aktivuloj de la kluboj? Antaŭnelonge mi ricevis leterojn de miaj amikoj el Litovio kaj Ukrainio, kiuj skribis, ke el tiuj respublikoj, en kiuj estas po kelkmiloj da esperantistoj, al la Stokholma Kongreso vojaĝis nur po tri homoj, ĉar tiel ordonis ASE.

"Ni ne silentul"

Sovetiaj esperantistoj opinias, ke iu deziras krei en SU Esperanton sen Esperanto-movado, kiam kelkaj fidindaj de ASE homoj reprezentas Esperanton en la lando, kaj oni volas devigi la klubojn silenti.

Tamen estas eraro opinii, ke sovetiaj esperantistoj emas silenti. Multaj aktivuloj jam komprenis, kio estas kio. Sub la slogano "Ni ne silentu!" jam aktivigas kontraŭstaro al la nunaj laborrimedoj de ASE. Sovetiaj esperantistoj ankaŭ estas homoj, ankaŭ ili volas havi siajn rajtojn, unue - rajton de la libera propagando de siaj ideoj, rajton labori en kaj por Esperanto, rajton libere kolektiĝi, kaj aliajn rajtojn de ĉiu libera homo.

Observanto el Soveta Unio.

☆ ☆ ☆

ANKAŬ SAT – ANO AVERTAS...

Mi respektas la personecon de Lanti

Se mi bone memoras, mi aliĝis al SAT en 1952-53. Mi restis fidela al ĝi ĝis nun, ĉar mi tute konsentas pri ĝiaj idealoj kaj celoj. Ekde mia aliĝo mi legis atente la statutojn kaj neniam ekzistis konfuzo en mia spirito pri la Asocio; nek pri la vortoj "Sennaciulo, sennaciisto, sennaciemulo, ktp..." Tial ke mi aliĝis al iu asocio, mi legis pri ĝia historio kaj ofte mi renkontis la nomon de Lanti. Mi ne estas speciale Lanti-emulo, sed mi havis por tiu kamerado respekton kaj admiron. Mi konstatas, ke depost ioma tempo iuj faras ofensivon kontraŭ Lanti, kontraŭ la formato de "Sennaciulo", la nomo de la Asocio ktp; estas iuj "inter-naciistoj", kies vera nomo estas komunistoj, almenaŭ ili sin titolas tiele. Pri tio mi ne plu konsentas. Ekzistas ja nun ofensivo de la "komunistoj" por kapti la diversajn gravajn asociojn kiel UEA kaj SAT. Do, post UEA estas SAT, kiu estas ilia celo. Mi diras nenion pri la komunistoj; kiel ĉiu homo ili rajtas erari, rajtas fermi la okulojn antaŭ la okazaĵoj; ni ne. Sovetio, ilia patrio, estas ĉio, kion oni deziras, sed ne socialista lando. Oni ne konstruas socialismon en tiu lando, ĉar al la demando "socialismo" la respondo estas "libereco". Libereco socia, persona aŭ politika forestas en Sovetio. Oni devas diri tion, ĉar Sovetio estas totalisma lando. Klasa socio regata de novaj "bojaroj", eĉ se ili estas ruĝaj. Se balotoj povus okazi tute libere en la t.n. "socialistaj landoj", la reĝimoj de tiuj landoj estus forbalaitaj, eĉ en Sovetio mem.

Mi konkludas, ke la vivo de SAT kiel libera, porsocialisma asocio, estas en danĝero. Mi alvokas ĉiujn ĝismedolajn SAT-anojn esti ja atentemaj pri la venontaj eventoj. Mi esperas erari, tamen...ekzistas signoj!

R. Martin (29009)

El "SENNACIULO" (februaro 1981, p.19)

Ĉu komenti?!



Jean Thierry
Vicprezidanto de ICNEM
Ĉefredaktoro de "Horizonto"

TRA LA ESPERANTO-GAZETARO

Jam de longe en ĉi tiu rubriko aperis eĉ ne unu linio: ja malgrasa enhavo de gazetaro ne povas produkti abundan rikolton da komentoj ...

Escepte interesa montriĝis la numero 1980-7 de "l'esperanto", la itala revuo. Kvankam la prezento de la itala kongreso en ĝi limiĝas ŝajne al turismo en la tutpaĝa artikolo: *"kio atendas la kongresanojn?"*, du kritikaj leteroj - unu de Michela Lipari kaj la alia de Hugh Clapham - levas fundamentan demandon, kiu cetere komprenigas la kaŭzon, kial homo kiel Kabe forlasis la movadon: *"...se al komencantoj ni parolas kaj legigas en itala ili lernas la italan!"* ŝi ekkrie substrekas; al kio li respondas: *"...prediki pri ĝia vivanta stato (tiu de esperanto) per vortoj alilingvaj inter samideanoj certe montras kredon ŝanceliĝantan aŭ mensan letargion."*

Sekvas ne malpli interesa recenzo pri la verko de Pietro Rizzo: *"Sesdek jaroj"*, originalaj prozaĵoj; bedaŭrinde oni subite stumblas sur stranga mencio de la recenzinto Anton Dega, kiu skribas: *"Kaj la nekaŝita elmontro de lia elviscera Lapennismo"*. Oni rajtas demandi sin, kion celas tia frazo. Ĉu temas do pri konfeso, ke la recenzinto estas trafita de malsana senmotiva "elviscera" kontraŭ-Lapennismo?

Feliĉe venas poste riĉa artikolo pri la neuzo de la ĥ-sono kaj ties anstataŭigo per "k".

Sed ĉefine en la rubriko *"nova sento"* elmontriĝas alia konfeso, tiu pri la politikiĝo de la gejunuloj ekde 1970: *"Renato Korseti (Italujo), honora prezidanto de TEJO, skize prezentis la historion de KER (Komisiono por eksteraj rilatoj), aparte la "politikan" agadon komence de la 70-aj jaroj,"* Jen plia konfirmo de la partipolitika ĝiro en koincido kun la sekretaj kunvenoj de la t.n. "konsultiĝoj de la asociaj reprezentantoj de la socialismaj landoj"!

La numero "1980 2-a Mayo" (!) de "Esperanta Finnlando" (!) konsistas el 6 paĝoj dediĉitaj sole nur al ortografia reformo (!); kio malfermas pordon al ĉia dialektiĝa projekto!

El "NOVZELANDA ESPERANTISTO" (n-ro 414-5-1980) brilas kelke da rimarkoj aparte substrekindaj pri la baloto de la estraro en UEA kaj de ties nova prezidanto Grégoire Maertens (Belgio). Legiĝas: *"Li estas la sola kandidato kaj la tuta Komitato subtenis lian elekton."* Ej! Ej! Demandu vin, sub kiaj reĝimoj tio estas laŭmoda! Kaj vi tuj sentos de kie blovas la-"nova vento"! La substreko de "sola kandidato" estas des pli sukoplana, ke s-ro Maertens en 1974 estis kandidato kiel komitatano C, kaj tiam forpelita, ĉar ne apartenanta al la politika kliko! Notinde, ke d-ro R. Corsetti vicprezidanto de MEM (Mondpaca Esperantista Movado), bone konata pro siaj politikaj orientiĝoj, fariĝis ankaŭ vicprezidanto de UEA. Notinde ankaŭ, ke subite Auld, Støp-Bowitz, Bormann kaj Pettyn senmotive ĉesis esti kandidatoj!

Krom tio la numero enhavas riĉan artikolon de Bernard Golden pri la transitiveco de verboj.

Dume, en "VENEZUELA STELO" (n-ro 20, junio 1980) la atento estas direktita al la demando: *"kiu estis la unua esperantisto en Ameriko?"*

En "ISRAELA ESPERANTISTO" (n-ro 73, septembro 1980) enestas raporto pri kongreseroj, sed pri tiu en Rauma (Finnlando) nenio koncernas la programan enhavon, ĉiuj notoj celas spritecon, kiel ekzemple: *"Partoprenis la kongreson ankaŭ multaj sudfinnaj kuloj (moskitoj), kiuj evidente bone ĝuis ĝin pro la varieco de la rasoj kaj devenoj de la ordinaraj (homaj) partoprenantoj. Iu eĉ diris, ke pro ili eblas titoli tiun ĉi kongreson kiel "troPIKA", "KULinara" kaj eĉ "KULTura".*

Dume, en "KOMUNA ESPERANTO-GAZETO" (oktobro 1980) la Lingvo Internacia jam tro ofte misnomita kiel "verda lingvo", k.t.p. fariĝas *"luma lingvo"*, kaj sur la paĝo 101 legiĝas diskuto pri la malapero de la gazeto mem! Kaj jen en la novembra numero de la sama gazeto brilas jena komento pri la kongreso en Stokholmo: *"Oni apenaŭ rimarkis la elektojn tie..."* Ĉu tio signifas, ke ĉio okazis post la kulisoj?

Tamen el kelkaj gazetoj fine sonoras krudaj veraĵoj.

En "ile-de-france esperanto" (n-ro 36-1980) kroniko de la Pariza Grupo (kiu perdis sian propran bultenon) levas la demandon: *"Ĉu malaperos la grupo? ...En 1979 86 esperantistoj pagis siajn kotizojn al la Centro, sed en 1980 nur 47 tion faris. Kial?"* Ve! Ĉi tiu artikolo de Emmanuel Chicot supozas konjektaĵojn anstataŭ fronti la realaĵon, ke la partipolitika superinfluo (kiu ŝanĝis la statuton en UEA) forpelis multajn homojn.

(Datirigo sur p. 40)

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro IVO LAPENNA

N-ro 22

45. INFORMADO: NUN kaj IAM

En n-ro 11/80 de *Esperanto* aperis artikolo de ĝia redaktoro *sm* sub la titolo "Informado: Felietono kaj Polemiko". Kiel kutime en la nuntempa organo de UEA, en ĝi svarmas malĝustaĵoj, prisilentoj, rektaj malveroj kaj blufoj. La tuta teksto celas kaŝi la bedaŭrindan realaĵon per klopodo kredi la neinformitajn aŭ tro forgesemajn legantojn, ke kvazaŭe nur "antaŭ deko da jaroj" la tiama CED kaj la Biblioteko Hodler "kolektis aŭ klopodis kolekti ĉiujn menciojn kaj artikolojn pri Esperanto, kiuj aperis en la nacilingva gazetaro", sed ke nun "la nombro de la artikoloj kaj mencioj tiel multe kreskis, ke apenaŭ plu eblas kaj apenaŭ plu necesas kolektadi ĉiujn etaĵojn, kies sola merito estas, ke ili mencias la Internacian Lingvon" (p. 184).

Ne estas klare kial tiajn artikolojn ne skribas, aŭ almenaŭ ne subskribas (simile al reĝoj, prezidentoj kaj aliaj politikaj figuroj, kiuj ja havas siajn profesiajn skribistojn de paroladoj kaj publikigotaj tekstoj) la estraranino pri informado, se fakte ŝi iom okupiĝas pri tiu fako, sed ni lasu tion kaj akceptu, ke almenaŭ post la publikigo ŝi, eble la prezidanto, aŭ eĉ la tuta Estraro de UEA aprobis la enhavon. Do, laŭ la oficiala organo de UEA, antaŭ deko da jaroj, t.e. antaŭ la hamburga partipolitika puĉo, nia informado estis tiel malvasta, ke estis facile kolekti la "malmultajn" nacilingvajn artikolojn kaj "menciojn", sed, jen, nun la interesiĝo fariĝis tiel grandega sen kia ajn organizita interveno fare de la Informa Fakto (IF) de UEA, ke ne plu eblas kolekti ilin! Kia kontentiga stato de la informado pri la Internacia Lingvo kaj kiel esperige por la estonteco de Esperanto! "Rezulte" - asertas la organo de UEA - "io grava, io esenca okazas kun la informado pri Esperanto", ĉar ĝi ŝanĝiĝas kvante kaj kvalite dum la lastaj jaroj". Tiu lasta aserto estas ĝusta: certe ne en pozitiva senco, kiel blufas la artikolo, sed, malfeliĉe, en tre negativa, kiel vidiĝos el sube prezentitaj nekontestebaj faktoj, kiujn ĉiu povas facile kontroli.

45.1. Iamaj Roloj de CED kaj IF

Jam la unua frazo en la analizata teksto estas malĝusta. Dum sia tuta 23-jara funkciado (1952-1975) la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) nek kolektis, nek okupiĝis pri kolektado de nacilingvaj artikoloj pri Esperanto, kvankam kelkfoje, tute escepte, okaze de la siatempaj grandaj mondaj kampanjoj (ekzemple okaze de la agadoj, kiuj rezultigis la konsultajn rilatojn kun Unesko kaj la konatan Rezolucion de 1954), apogcele ĝi prizorgis ankaŭ tion. CED okupiĝis pri sciencaj esploroj, dokumentado (precize 4408 katalogitaj dokumentoj ĝis la fino de 1974), publikigado de dokumentoj en Esperanto kaj en diversaj naciaj lingvoj (entute 391 ĝis la fino de 1974), kaj plenumis amason da aliaj laboroj, kiel koncize prezentite en ĉap. 20.2 de *Esperanto en Perspektivo (EeP)* sur p-oj 669-678. Pretere dirite, CED estis tiel konata ankaŭ en la ekstera mondo, ke eĉ nun, do pli ol ses jarojn post la fakta likvido de la ĝishamburga CED, plu venadas presaĵoj kaj korespondaĵoj ankoraŭ sendataj al ĝis iama adreso, nome la adreso de mi mem kiel ĝia honorofica direktoro de 1952-1975. La redakcio de la oficiala organo de UEA - kaj, kompreneble, la nunaj estraroj de UEA kaj de CED - devus scii tion.

Ankaŭ la tiama Informa Fakto (IF) de UEA, fondita unue kiel Propaganda Fakto en 1949, fakte ne okupiĝis pri "kolektado de artikoloj kaj mencioj", kaj ankaŭ tion la redakcio kaj almenaŭ la estraranino pri informado devus scii. Tute alia afero estas, ke en la kadro de siaj vastaj kaj multdirektaj agadoj la IF de UEA utiligadis la esplorkomitatojn de CED kaj daŭre sekvis pere de la landaj IF-oj kaj de siaj rektaj kunlaborantoj en diversaj landoj la kvanton kaj karakteron de informado pri la Internacia Lingvo. Ĝuste tio ebligadis plibonigon de la informado, inkluzive kompetentajn reagojn je diversaj misprezentaj malĝustaĵoj pri Esperanto. En la kadro de tiu dinamisma aktivado estis farataj ankaŭ statistikoj, kies rezultoj sporade aperadis en *Esperanto* kaj ĉiam en la ĉap. pri informado de la Estrara Raporto. Nur kiel eta ekzemplo de la tiama celtrafa laboro sur la kampo de informado menciindas la *Tabela Trarigardo pri la Informa Laboro en 1962* sur p. 128 en *Esperanto*, n-ro 692-3 (7-8), julio-aŭg. 1963. El ĝi vidiĝas, ke nur en tiu jaro en 33 landoj entute aperis minimume 16.092 nacilingvaj artikoloj kaj informoj (ne "mencioj") pri Esperanto, el kiuj nur 0,7% estis malfavoraj; okazis 1753 prelegoj kun entute 94.348 ĉeestantoj, aldone al 949 radio-prelegoj pri nia lingvo; estis aranĝitaj 355 ekspozicioj, kiujn vizitis 392.404 personoj; kaj estis distribuitaj 468.660 flugfolioj kaj similaj propagandiloj. Alia ekzemplo: en 1973 - la jaro antaŭ la hamburgaj eventoj - aldone al la bone funkciantaj landaj IF-oj, la IF de UEA havis 92 individuajn kunlaborantojn en diversaj landoj (ĉap. pri informado en la Estrara Raporto por 1973/74). Ĉio-ĉi, kaj multo alia eĉ

ne menciebla ĉi tie, estis ne nebulaĵoj, inventaĵoj, blufoj kaj promesoj por la estonteco, sed absolute ĝustaj faktoj raportitaj surbaze de nepre fidindaj sciigoj. Ĉiu povas konstati tion el la Estraraj Raportoj por la periodo 1950-1974.

La informado, konscie kaj laŭplane evoluigita al bone organizita informa aparato de UEA, unuflanke, kaj la scienca-dokumenta laboro de CED, aliflanke, estis la du ĉefaj faktoroj, kiuj, kune kun la aliaj agadoj laŭ la Bazaj Laborprogramoj, kaŭzis grandegan altiĝon de la respekto por Esperanto en la mondo, konsiderindan disvastiĝon de la lingvo kaj internan fortikigon de UEA kaj de la tuta Esperanto-Movado.

Tiel estis "antaŭ deko da jaroj" kaj entute antaŭ Hamburgo. Sed kio pri la posthamburga informa laboro de UEA? Fakte nenio. Ankaŭ tiun tutan agadbranĉon la posthamburgaj gvidantaroj de UEA sukcesis rapide detrui. Jam en la Estrara Raporto por 1974/75 la ĉap. "Informado" konsistas el jena unusola frazo: *"Raporto de la kompetenta estrarano ne atingis nin"*. Poste, dum plenaj kvin pliaj jaroj nenio notinda okazis, se oni esceptas la daŭre, tede, ĉiujare ripetatajn kaj neniam plenumatajn promesojn, kiel plian fojon ĉiu povas mem konstati legante la kelkajn komplete senenhavajn erojn sur p. 88 de *Esperanto* (diference de la antaŭhamburga periodo, kiam la Jarlibro aperadis en du dikaj volumoj kaj en la Dua Volumo troviĝis ampleksa Estrara Raporto pri ĉio konkrete farita en ĉiuj agadbranĉoj, nun aperas nur unu volumo kaj la Estrara Raporto estas publikigata en *Esperanto* - unu el multaj regreseoj). Plian fojon pretere dirite, ekde la puĉo de 1974 neniam kiu ajn el la sinsekvaj estraranoj pri informado verkis unusolan principan artikolon pri tiu agadbranĉo, nek prezentis unusolan ideon en kiu ajn formo pri kiu ajn aspekto de efika informado pri la Internacia Lingvo. Ne estas surprize, ke sur tiu kampo regas plena anarkio kaj ke eĉ la plej grandajn fuŝaĵojn la organo de UEA laŭdas kiel unikajn sukcesojn aŭ kiel "raraĵon ne ekzistantan aŭ maleblan antaŭ deko da jaroj". Ni ekzameni iomete tiujn verajn raraĵojn.

45.2. The Guardian kaj aliaj renomaj mondaj gazetoj

La redaktoro de *Esperanto* skribas: *"Nun estas preskaŭ tute ordinara afero vidi artikolon pri Esperanto en, ekzemple, Le Monde, The Guardian, Asahi Simbun kaj aliaj mondrenomaj nacilingvaj gazetoj"*. Bedaŭrinde mi ne kapablas legi *Asahi Simbun*, sed mi tre ofte legas *Le Monde* kaj plurajn aliajn mondrenomajn gazetojn, dum *The Guardian* mi legas ĉiutage. En *Le Monde* mi jam de tre longe nenion legis pri Esperanto. En *The Guardian* kaj en aliaj britaj gazetoj aperis nombro da artikoloj en decembro 1978 okaze de la "100-jara datreveno de Esperanto" - hontinda fuŝaĵo, pri kiu respondecas Brita Esperanto-Asocio, kiu, ab-

solute nekredeble, informis la gazetaron, ke la 5-a de decembro 1978 estas la tago de la "naskiĝo" de Esperanto. La artikoloj estis tre malfavoraj, en plu-raj oni abunde misprezentis ĉion en ligo kun Esperanto kaj primokis la lingvon. Necesis tuj reagi por almenaŭ parte ripari la teruran malbonon. La redaktoro de tiu ĉi rubriko sendis reagajn korektojn al *The Observer*, *The Guardian* kaj *The Daily Telegraph*. Aliaj seriozaj esperantistoj agis same. Rezulte aperis aro da ĝustigaj leteroj en la menciitaj gazetoj. Tiu tuta pli ol bedaŭrinda afero estis detale prezentita en la ero 27 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto* n-ro 1/79. Tio, do, estas unu el la "raraĵoj", fakte maleblaj "antaŭ deko da jaroj".

La alia "raraĵo" estis artikolo de Polly Toynbee, verkita surbaze de intervjuo kun S-ro H. Platt, sekretario de Brita Esperanto-Asocio. Ĝi aperis en *The Guardian* de la 10-a de decembro 1979, precize unu jaron post la "100-jara datreveno de Esperanto"! En la artikolo, kiu pro teknikaj kaŭzoj ne povis esti reproduktita en *Horizonto*, jam en la titolo, dike presita, troviĝas okulfrapaj misinformoj, ke Esperanto "ne estas natura", "ne havas vivon", "ne estas bona por poezio", kiun "en ĉiu okazo S-ro Platt ne ŝatas". En la teksto mem troviĝas amaso da aliaj misprezentadoj: lingvo sen sociaj responoj, sen asociiĝoj, sen kulturo, sen literaturo, sen popolo, sen vivo, ktp., ktp. laŭ sufiĉe konata melodio, al kiu abunde kontribuas parto de la esperantistaro mem, se oni ne kontraŭbatalas tiajn stultaĵojn unuavice interne de la Esperanto-Movado, kio ja okazadis antaŭ Hamburgo. Eĉ rekte ofendaj esprimoj ne forestis: "Estis iom malfacile por ni eltrovi, ĉu D-ro Zamenhof estis okulisto aŭ okultisto". Plian fojon necesis reagi kaj, feliĉe, publikiĝo de mallongaj ĝustigoj almenaŭ tute iomete riparis la malbonon, kvankam, kompreneble, la negativa impresado, kiun ricevis la legintoj de la artikolo, certe ne povis esti forviŝita.

Tiom pri la "tute ordinara afero vidi" (espereble ankaŭ legi) artikolojn en *The Guardian* kaj aliaj mondrenomaj britaj gazetoj.

45.3. Nun pri Jugoslavio

La aserto de *sm*, ke "antaŭ deko da jaroj (la aŭtoro, evidente, neniel povas liberiĝi de tiu "antaŭ deko da jaroj") nur lertuloj de la tipo de Tibor Sekelj sukcesis fojfoje enŝovi ion pri Esperanto en la nacilingvan gazetaron" estas komplete malvera. Jam longe antaŭ la Dua Mondmilito la informado pri Esperanto en Jugoslavio estis kaj kvante kaj kvalite sur relative tre alta nivelo. Pri tio certe rememoras ĉiu jugoslavia antaŭmilita esperantisto, sed ni lasu tion. Sendube estas ĝojige konstati, ke, paralele kun la interna politika evoluo de tiu lando kaj kun ĝia pozicio de nealianciĝinta ŝtato en internaciaj rilatoj, malfermiĝis novaj eblecoj informadi pri la Internacia Lingvo kaj, ĝe-

nerale, agadi por Esperanto. Alia afero estas ĝis kiu grado kaj en kiu formo tiuj eblecoj estas efike ekspluataj. Estus interese foje legi en *Horizonto* objektivan artikolon pri tio, verkitan de kompetenta esperantisto vivanta en Jugoslavio. En ĉiu okazo la artikoloj de M. Gjivoje en la zagreba taggazeto *Vjesnik*, menciitaj en *Esperanto*, estas pozitiva kontribuo al pli bona kompreno de la lingva problemoj kaj de la rolo de Esperanto. Ankaŭ la felietono de Spomenka Ŝtimac, publikigita komence de 1977 en la sama *Vjesnik*, prezentas objektivu la faktojn kaj donas bonajn analizojn kun la escepto de 2-3 eroj. Kiel mi tiutempe skribis en alia kunteksto, ŝia felietono estas plene - kun la sola escepto de la 2-3 malĝustaĵoj - bazita sur miaj verkoj, kvankam tio ne estas eĉ menciita en la felietono. Tamen, ne multe gravas, ĉar la felietono havis bonan eĥon. Sed estus normale indiki la fontojn. Mi tion menciis nur por doni plian ekzemplon de plagiatoj, kiuj abundas en la nuntempa UEA. Tio kondukas al plia punkto en la artikolo de *sm*.

En ĝi estas dirite, ke antaŭ kelkaj monatoj sufiĉe konata eldonejo en Jugoslavio publikigis 300-paĝan libron *Živi Jezik* (La Vivanta Lingvo) de iu Radoslav Gajić, nekonata aŭtoro. En la magazino *NIN*, fakte tre prestiĝa jugoslavia periodaĵo, aperis en la n-ro de la 21-a de septembro 1980 akra kritiko de Nikola Rašić, en kiu, laŭ *sm*, la aŭtoro asertas, ke "*la libro de Gajić estas plagiata transpreno ĉefe el la verkoj de Waringhien, Wells, Szerdahelyi, k.a.*" Mi ricevis el Beograd la koncernan n-ron de *NIN* kaj konstatas, ke tiu "k.a." en la artikolo de *sm* estas neniu alia, ol mi mem, kies nomo troviĝas sur la unua loko en *NIN*. La koncerna parteto en *NIN* tekstas "...Gajić pruntas de tiaj nomoj, kiaj estas Lapenna, Szerdahelyi, Wells aŭ Waringhien. La unua estis dum preskaŭ tridek jaroj ĉefrunte de la monda Esperanto-Movado..." ktp. pri la aliaj. Eĉ el Kanado iu sendis al mi kroatlingvan gazeton *Danica*, kiu sur p. 3 de n-ro 40 de la 3-a de oktobro 1980 pritraktas la saman aferon kiel *kulturan skandalon* kaj mencias mian rolon en la Esperanto-Movado. La ellaso de mia nomo en *Esperanto* ne estas hazardo, kompreneble. En la nuna strikte cenzurata *Esperanto* mia nomo devas esti ellasita eĉ se temas pri plagiatoj el miaj verkoj, ĉar, interalie, la tezo pri "antaŭ deko da jaroj" perdus sian valoron! Cetere, plagiatoj tute ne estas ia "raraĵo" en la nuna UEA. En unu el la Esperanto-Dokumentoj de UEA eĉ D-ro H. Tonkin, la antaŭa prezidanto de UEA, plagiatis el mia verko, kiel montrite en la rubriko ED, ero 5.1 en *Horizonto* n-ro 5/76.

(Finota en n-ro 33(3))

☆ ☆ ☆

Atentigo: *La Statuto de ICNEM*, menciita sur p. 1 de *Horizonto* n-ro 1/81, ne aperis en tiu numero de *Horizonto*, ĉar intertempe ĝi estis publikigita en n-ro 6/80 de nia revuo sur p-oj 87-89. Bv. korektadon. Cetere tiu interesiĝanto povos senpage ricevi broŝuron pri *la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM)* kun ĝia *Statuto* de la sekretario-kasisto, s-ro cand.oecon. H.V. Ras-mussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danlando.



"Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo."

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

La Esperanto-redakcio de la Aŭstria Radio Vieno ĵus eldonis SUPERRIGARDON PRI AŬSTRIO, broŝuron nur kvindekpaĝan, tamen multon enhavantan. Ĝin skribis d-ro Karl Beckmann, redaktoro-ĉefo de la Viena Esperanto-redakcio (ORF, Würzburggasse 30, A-1136 VIENNO). La broŝuro konsistas el kolekto de 26 felietonoj pri la Aŭstraj historio kaj kulturo. Ili agrable legiĝas pro la lingve facila babilado kaj pro la informriĉa vario. El iam sur mallongondo senditaj mozaikeroj fariĝis belvedera mozaiko. Ĉiu, kiu iam vojaĝis Aŭstrion, plezurigita rememoros multon, kion li jam sciis, kaj multon por li novan sciigos. Kiu ankoraŭ ne vojaĝis tien, ekhavigos inklinon, tion fari.

R.Ŝ.

TRA LA ESPERANTO-GAZETARO (Daŭrigo de p. 34)

En la numero 415 - 6-1980 de "NOVZELANDA ESPERANTISTO" la rubriko: "Ĉu vi legis?..." atentigas pri la praveco de du artikoloj en HORIZONTO (majo-junio 1980): "Ivo Lapenna daŭrigas sian fortan kritikon kaj analizon de la tezo prezentita de D.Blanke en "Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado". Sumiĝas la argumentoj (kun kiuj mi tute konsentas) en la frazo: "Drezen provis senigi la Internacian Lingvon ĝuste de tiu tuthoma solidariĝa rolo por plaĉi al la tiamaj mastroj. D.Blanke faras la samon por plaĉi al la nunaj." En la sama numero oni reprenis parton (tre detalan) el prelego de Jean Thierry en la NEM-Konferenco de 1978 pri la neŭtraleca principo. Pensigaj vortoj."

J.T.

KONCIZE EL PARTIAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ/INSTANCOJ EN UEA

En tiu ĉi rubriko *Horizonto* ekde n-ro 33 (3) regule publikigados mallongajn informojn pri *partipolitikaj agadoj de organizaĵoj kaj instancoj apartenantaj al UEA kiel "aliĝintaj asocioj"*. Se ili ne konsistigus parton de UEA kaj tial ne kompromitus ĉiam pli tiun Asocion kaj la tutan Esperanto-Movadon, *Horizonto* tute ne menciis ilin. Efektive, *Horizonto* eĉ ne ekzistis, ĉar ĉiuj fortoj de N.E.M. kaj ĉirkaŭ *Horizonto* troviĝis en UEA. Ĉi tiel, bedaŭrinde, necesas daŭrigi se ne pro aliaj kaŭzoj, do por klare distancigi la neŭtralan Esperanto-Movadon disde la politikiginta nuna UEA.

LA MISPREZENTOJ DE "STARTO"

Finfine la redakcio de STARTO (la revuo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio) ekaludas pri la eventoj okazintaj jam de 1974 ekde la Kongreso en Hamburgo... Sed kiamaniere ĝi rakontas la historion!!! Tiu ĉi fariĝas elstara fantaziaĵo tra la misforma prismo de la redakcio tiagrade, ke la korektado de la misinformoj postulas tutpaĝan artikolon.

"Dum la U.K. 1974 en Hamburgo prof. Lapenna ne estis reelektita kiel prezidanto de UEA." Jam ĉi tiu unua frazo komenciĝas per misorientado. La vero estas, ke prof. Lapenna *neniel* kandidatiĝis, ĉar li tuj dekomence ekŝiĝis el siaj funkcioj en UEA por protesti kontraŭ la malatento de la statutaj reguloj kaj la malobservo de la neŭtraleco.

"Pro tio ke malfacilas konfesi malvenkon, la venkito ŝatas aserti, ke la "miselekto" nur povis okazi pro "puĉo". Kelkaj konsentis tion. Tamen ilia nombro ne sufiĉis por povi starigi propran kontraŭ-organizaĵon." La vero estas, ke ĝis nun la Neŭtrala Esperanto-Movado konstante rifuzis mem *"starigi propran kontraŭ-organizaĵon"*. Eĉ la Centro ICNEM estas destinita por faciligi la aperadon de HORIZONTO kaj tute ne celas konkurenco UEA (!)

"La super-neŭtraleco (sic!) , por kiu prof. L. nun pledas, fariĝis unuflanka politika okcidenta politiko. Tio estis jam rimarkebla en tio, ke Lapenna, kiam li ankoraŭ estis prezidanto de UEA, ne povis vojaĝi al la U.K. 1973 en Beogrado, ĉar la jugoslavia registaro malpermesis lin trapasi la limon. Tia persono, kiu ne estas bonvena en ĉiuj landoj, povas ankaŭ ne reprezenti mondan organizaĵon kia UEA." La bela argumento, kiu vere "trapasas ĉiujn limojn"! Kia konfeso! La vero estas... Ja ĉiuj scias, ke tra la sovetisma prismo, kiu ne estas "por" soveto, estas nepre konsiderata kiel netolerebla malamiko de *"politika okcidenta politiko"*(!) Eĉ la lasta argumento sufiĉas per si mem: sen alkonformiĝo al la direktivoj de la partia premgrupo efektive neniu eĉ en UEA estas akceptita sub la "nova" reĝimo; tion ĵus spertis la komitatano s-ro Simonnet (detaloj sur p.21 de HORIZONTO n-ro 31)!

APOGO DE LA VICPREZIDANTO DE UEA AL "STARTO"

"La UEA-estraro neniam respondis iun atakon aŭ kalumnion, en saĝa retenemo, sed daŭrigis sian aktivadon sen ia partia deviado, ekz. adaptante la statuton al la necesoj de la organiza neŭtraleco." Nu, la vero estas... Ĉu do antaŭe la statuto ne taŭgis pro malneŭtraleco? Kio estas neŭtraleco *"organiza"*? Kaj kia la "nova" neŭtraleco! Ekzemple en la sama

numero de *STARTO* sur la 4-a paĝo estas legeble: "Ne, la registaroj de la eŭropaj kapitalismaj landoj absolute ne interesiĝas pri la vivo de la laboristoj en la socialisma areo. Ili timas, kaj sendube pravas, ke iam la atingita sukceso en tiuj landoj, estos kopiata de la laboristaro kaj progresemaj fortoj de la kapitalismaj landoj kaj tiam finiĝos la privilegioj de la multnaciaj entreprenoj, monopoloj kaj trustoj." Kaj kompreneble post tia "neŭtraleca" artikolo jen sur la paĝo 16 staras ekstrakto de letero: "Dankon pro senditaj numeroj de *STARTO*. Vere ni devus trovi la manieron por disvastigi ĝin ankaŭ inter okcidentaj esperantistoj. Tre amikajn salutojn. Renato Corsetti, vicprezidanto de UEA." Konkludu mem pri tia nova speco de neŭtraleco!

"Dank'al Dio, la mondo ekscias preskaŭ nenion de tiu interfrata militeto." La vero estas, ke ĉiuj ĵurnalistoj bone konas la aferon: dum la 6-a Konferenco de NEM en Strasburgo pluraj venis mem sen alvoko kaj tuj levis la saman demandon! Cetere, "Dank'al Dio" ne hezitas skribi la artikola aŭtoro: por trompi kiujn?

J.T.

DEMENTO DE PLIAJ MENSOGOJ


Jam dum multaj jaroj difinitaj Esperanto-periodaĵoj sisteme okupiĝas pri nigrigado de mia nomo per inventaĵoj, kiujn povas eltrovi nur psikopatoj aŭ personoj agantaj laŭ la konata recepto de la "ideologia lukto". Se mi devus reagi je ĉiuj, tuta numero de *Horizonto* ne sufiĉus. Mi limigas min nur al du el la plej lastaj:

1. En *Starto*, n-ro 5/80 (p-oj 4-5) aperis plia atako, en kiu, interalie, estas dirite, ke dum la UK en Hamburgo (1974) mi "ne estis reelektita kiel prezidanto de UEA". Citante el konate kalumnia gazeto *Heroldo*, ĝia frata *Starto* eĉ asertas tuj en la sekvanta n-ro 6/80 (p. 26), ke en Hamburgo mi "akiris ne pli ol 25% da komitatanaĵ voĉoj". La vero estas, ke en Hamburgo mi tute ne kandidatiĝis al la prezidanteco, demetis ĉiujn aliajn funkciojn en la politikiĝinta UEA kaj rifuzis la *Honoran Prezidantecon*, kiun proponis al mi la konspirintoj pere de komitatanoj Aleksiev kaj Boersma, preskaŭ surgenue petantaj min akcepti ĝin.

2. La sama *Starto* en n-ro 5/80 ankaŭ asertas, ke mi ne povis vojaĝi al la UK en Beograd (1973), ĉar "la jugoslavia registaro malpermesis lin /al mi/ trapasi la limon". La vero estas, ke nek tiam, nek kiam ajn pli frue aŭ poste kiu ajn jugoslavia aŭtoritato malpermesis al mi trapasi la limon. Pretere dirite: se fakte tio estus okazinta, ĝi estus hontinda por la jugoslavia registaro, certe ne por mi, aŭ por miaj internaciismaj, humanecaj kaj demokrataj principoj.

FORPASIS

D-RO GEORGES SALAN



D-ro Salan en la
NEM-konferenco
en Jaca

Georges Salan, doktoro pri medicino, naskiĝis en 1901 en Roquecourbe (Tarn). Dum la milito li multe partoprenis en la rezistado kun J. Moulin kontraŭ la okupanta armeo kaj tial estis deportita en koncentrejojn. En 1946 li estis deputito de Gard en la Konstitucia Asembleo. Esperantisto tuj post la Unua Mondmilito li troviĝis for de SAT pro komunisteco kaj for de la Komunisto Partio pro esperantisteco... Reveninte al UEA en 1973 li bone komprenis, kio okazis en 1974 kaj plurfoje kontribuis en *Horizonto* por konsciigi la esperantistojn.

D-ro Salan mortis la 5-an de februaro 1981.

La Redakcio de *Horizonto* prezentas siajn sincerajn kondolencojn al s-ino Salan, la vidvino de nia kunbatalanto.



INTERESA PREMIO – KONKURSO DE "VOĈO"

Jugoslavia E-revuo *Voĉo* (56227-Borovo, Školska ul. 25) anoncis premio-konkurson: ekde n-ro 1/1981 aperos en la unuaj kvar numeroj po 4 demandoj el la historio de E-movado kaj E-literaturo, al kiuj solvojn eblos sendi kune post apero de la 4-a numero. En la 5-a numero aperos la ĝustaj respondoj kaj la nomoj de tri premiogajnintaj abonantoj: 1-a premio 100,- gld. aŭ egalvaloro, 2-a premio *Enciklopedio de Esperanto* (valoro de 50 gld) kaj la 3-a unujara abono al *VOĈO* por 1982. (Jarakono por *Voĉo* por Jugoslavio 150,- din., por aliaj landoj 16,- gld aŭ egalvaloro).

El niaj Organizaĵoj

NOVA NUMERO DE INTERNACIA JURA REVUO (IJR)

La 48-paĝa n-ro 2/80 de *Internacia Jura Revuo* estas riĉenhava, kiel kutime en la lastaj jaroj. Aldone al la Enkonduka Rimarko, en kiu la nova redaktoro, D-ro Klaus Perko, prezentas la enhavon kaj dankas al Prof. D-ro I. Lapenna pro lia multjara redaktado de tiu ĉi periodaĵo, en ĝi troviĝas la jam establitaj rubrikoj: Artikoloj, Notoj, Recenzoj kaj Oficiala Informilo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. Du artikoloj - tiu de Prof. Lapenna pri la "Sovetiaj Konstitucioj en la Lumo de la Konflikto inter Marksisma Ideologio kaj Ruslanda/Sovetia Realajo" kaj tiu de D-ro K. Perko pri "La Konstitucio de Aŭstrujo" - estas daŭrigoj de la artikoloj publikigitaj en n-ro 1/80. Sekvas artikolo de D-rino Maria Rafaela Uruena pri la starpunkto de Hispanio rilate fiŝkaptadon laŭ internacia juro de la maro. En la rubriko NOTOJ troviĝas informoj pri la Dua Monda Kongreso pri Sovetaj kaj Orienteŭropaj Studoj, okazinta la pasintan oktobron en Garmisch (FR Germanio), kaj pri virinjuro kiel nova specialfako en la Jura Fakultato de la Universitato en Oslo. Du recenzoj de gravaj verkoj kaj pluraĵoj en la Oficiala Informilo de IEAJ kompletigas tiun ĉi kajeron.

IJR estas oficiala organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. Ĝi aperas du fojojn jare kaj ĉiu kajero havas 48 paĝojn plus kvar kovrilpaĝojn. Laŭ sia enhavo la periodaĵo estas interesa ne nur por juristoj, sed ankaŭ por ĉiu klera homo, kiu interesiĝas pri aktualaj juraj demandoj precipe en la sferoj de kompara kaj internacia juro. La membroj de IEAJ ricevas ĝin senpage, sed ĝi estas abonebla ankaŭ por ne-membroj. La jara kotizo al IEAJ estas 120 aŭstriaĵ ŝilingoj kaj la jara abono, same tiel, 120 aŭstriaĵ ŝilingoj aŭ egalvaloro.

Aliĝpetojn, kotizojn kaj abonojn akceptas la sekretario-kasisto de IEAJ, D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.

**Aliĝu kaj instigu viajn geamikojn aliĝi al la
INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO.
Detalojn v. sur la dua interna kovrilpaĝo.**

Frontpaĝa bildo:

Bronza skulptaĵo de *Henry Moore* en la parko de la muzeo Louisiana proksime al Krogerup, la loko de la 7-a NEM-konferenco.



OFFSET/REPRO/COPY
ESKOFOT A/S

35-37 Industriparken
DK-2750 Ballerup-Denmark
Telephone 02-97 4400
Telex 35 156 esko

LINGVA ANGULO

POR UNUECA TERMINOLOGIO: KOMUNO, KOMUNUMO, KOMUNUMARO, KOMUNAĴO

Parolante aŭ skribante pri Eŭropa Ekonomia Komunaĵo oni en la lasta tempo uzas ankaŭ la esprimojn "komuno", "komunumo", eĉ "komunumaro". Principe, ĉiu el tiuj terminoj povus taŭgi por la angla "*community*", la franca "*communauté*" k.s. en aliaj lingvoj, kiam temas pri la organizaĵo de eŭropaj ŝtatoj sub la nomo Eŭropa Ekonomia Komunaĵo, ofte Eŭropa Komunaĵo, kelkfoje ankaŭ Eŭropa Komuna Merkato, aŭ nur Komuna Merkato.

Internacia Jura Revuo, la oficiala organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ), jam delonge enkondukis la terminon "Komunaĵo" por tiu organizaĵo. PIV sur p. 518 akceptis tion. Efektive, la termino "komunaĵo" ŝajnas la plej taŭga en tiu kazo pro jenaj kaŭzoj:

(i) La esprimo "Komuno" estas kutime uzata por la Pariza Komuno de 1871, kiun PIV nomas "komunumo" kun derivaĵo "komunumisto". Fakte "Komuno" (kun majusklo) estas konforma al la franca "*Commune de Paris*", de kie ĝi eniris en tre multajn lingvojn, ankaŭ en la Internacian. En tiu formo ĝi estas internacia. Krome, el *Komuno* en tiu senco oni povas tre bone, trafe kaj elegante derivi *komunano* anstataŭ la peza "komunumisto". Do, *Komuno* plu restu por la *Pariza Komuno* de 1871.

(ii) "Komunumo" havas unuavice la signifon de baza administra distrikto, kies centro estas urbo aŭ vilaĝo (PIV); krome la du aliajn signifojn laŭ PIV. Ĝi estu uzata nur en tiuj tri sencoj.

(iii) "Komunumaro" tuj elvokas la ideon de aro da aŭ eĉ tuto de komunumoj, nome de bazaj administraj distriktoj. En tiu senco, kompreneble, ĝi estas taŭge uzebla.

(iv) "Komunaĵo" - esprimo paralela al "organizaĵo" - estas absolute konforma al la lingvouzo bazita sur la Fundamento. Ĝis antaŭ nelonge nur ĝi estis uzata por *Eŭropa Ekonomia Komunaĵo* aŭ nur *Eŭropa Komunaĵo*, aŭ, en kunteksto, *la Komunaĵo*. Necesas daŭre kaj sisteme uzi ĝin en tiu senco por ne krei konfuzon. Unueca terminologio, precipe sur la kampo de juro kaj internaciaj rilatoj, estas fundamenta kondiĉo de klareco; krome, unu el la bazaj premisoj de la lingva unueco laŭ la Fundamento.

Do: La *Pariza Komuno* estas abunde pritraktita en la verkoj de Marx...; la *komunumoj* en la landoj de la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo, ktp.

Aliĝu tuj al la INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO—MOVADO, por ke ni kune savu la HUMANISMAN INTERNACIISSMON en la Esperanto—Movado!!

Esperanto en Radio

RADIO ROMA

La Itala Radio (RADIO ROMA - RAI) elsendas en Esperanto ĉiun sabaton de horo 20.00 ĝis 20.20 laŭ grenviĉa tempo/GMT (21.00-21.20 laŭ mezeŭropa tempo/MET), sur jenaj ondlongoj/frekvencoj:

metroj	31,33	41,15	41,24
kilohercoj/kHz	9575	7290	7275

Raportoj pri aŭskulto estas bonvenaj (oni bonvolu indiki: daton de aŭskulto, horon, ondlongon/frekvencon, tipon de aparato kaj de anteno, kvalito de la aŭskulto, almenaŭ unu detalon de la programo, subskribon, adreson klare legeblan).

Responde al la raportoj de aŭskulto ni sendas konfirmo-karton (QSL) en Esperanto.

Ankaŭ estas bonvenaj sugestoj, rimarkoj, demandoj pri Italio, eĉ simplaj salutoj kaj aprecoj de la programoj. Sed ankaŭ estas por ni valoraj kaj gravaj eventualaj kritikoj kaj plendoj. Ĉiuj korespondadoj estas tradukataj en italan lingvon por la diversaj radiaj oficejoj.

Oni skribu laŭ ĉi tiu adreso: RADIO ROMA, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma Centro Corr., Italio.


DENOVE PRI NIA REVUO *(Daŭrigo de p. 26)*

La fakto, ke ICNEM ne petas pri donacoj, tamen, ne signifas, ke la Centro rifuzas donacojn, kiujn la legantoj kaj aliaj proprainiciate ofertas al la revuo. Tiajn ni kolektas en *Fonduso Horizonte* por uzi ilin en okazo de neceseco. Pri la fonduso legu sur paĝo 48.

La enhavo de tiu ĉi numero estas nekontesteble ne tiel varia, kiel ni planis. La kaŭzo estas, kiel la leganto konstatos, ke ni ricevis tiom da nepretuj publikigendaj artikoloj pri temoj koncernantaj la ĉefajn celojn de ICNEM, ke restis loko nur por malmulta alia materialo. La unuaj estas artikoloj pri atakoj al la politika neŭtraleco de la Esperanto-movado aŭ ĝenerale pri malrespekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj kaj pri la influo de ekstermovadaj partipolitikaj instancoj al UEA. Ni referencas al artikoloj 3.1.4 kaj 3.1.5 de la Statuto de ICNEM.

Pri la enhavo de *Horizonto* kaj pri ĝia teknika aranĝo oni havos okazon diskuti dum kunveno en la kadro de la 7-a *Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado*.

HVR



H.V. Rasmussen
Sekretario-kasisto de ICNEM
Redaktoro de "Horizonto"

7-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

12 – 18 julio 1981

Altlernejo Krogerup, Humlebæk, Danlando.

Koresponda adreso: S-ro cand.oecon. H.V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danlando.

Aliĝo. Aliĝilo estas enmetita en tiun ĉi numeron de *Horizonto*. Ni atentigas, ke la konferencaj kotizoj plialtiĝos la 1-an de aprilo, kiel indikite sur la aliĝilo. Tamen, temas pri nur 25 dkr.

Pli grava motivo por frua aliĝo estas, ke la nombro da litoj en *Altlernejo Krogerup* estas limigita (vidu p. 8 de la antaŭa numero). La maksimumo estas 130 litoj je la kondiĉo, ke ĉiuj ĉambroj estos uzataj de po du konferencanoj, kelkaj eĉ de tri konferencanoj. Ĉiu ĉambro rezervita por nur unu persono reduktas la kapaciton, kaj ĉiu ĉambro rezervita por du personoj ne povos funkcii kiel tri-lita.

Tial ni konsilas al vi ne plu prokrasti aliĝon.

Programo. La detala programo estos dissendita al la konferencanoj en konvena tempo antaŭ la konferenco. Ĉisube ni informas nur pri la plej gravaj punktoj.

La konferenco estos malfermita dimanĉon vespere.

La Inaŭguran Paroladon faros la prezidanto de ICNEM, Prof. D-ro IVO LAPENNA pri la temo Survoje al la 100-jara Datreveno de Esperanto: Atingoj, Malsukcesoj, Obstakloj.

London – au london kaj mardon – okazos 4 prelegoj rilate al la datreveno:

1. **Bazaj Ideoj pri la Kadra Programo por la Celebrado de la Datreveno de Esperanto en 1987**
Cele al Amasa Plua Disvastigado de la Internacia Lingvo (Prof. D-ro IVO LAPENNA).

2. **Lingvaj Malhelpoj al Okcidenteŭropa Ekonomia kaj Kultura Kunlaboro** (cand.jur. SVEN ZIEGLER, *juĝisto de la Urba Tribunalo de Kopenhago, antaŭe oficisto de la Eŭropa Komunaĵo en Bruselo*).

3. **Ĉu la Lingvo-diverseco Damaĝas la Teknologian kaj Ĝenerale Ekonomian Helpon al la Landoj de la Tria Mondo?** (D-ro PAUL NEERGAARD, *Kopenhago*).

4. **La Pozicio de la Franca Kompare kun la Angla kaj Aliaj Naciaj Lingvoj en la Mondaj kaj Regionaj Interŝtataj Organizaĵoj** (lektoro JEAN THIERRY, *Parizo, vicprezidanto de ICNEM*).

Ĉiu prelego daŭros ĉ. 45 minutojn, post kio sekvos mallonga diskuto. La tuta temaro estos pridiskutita en *Ĝenerala Diskuto*.

Por ebligi kiel eble plej efikan diskutadon kun la celo atingi kiel eble plej pozitivajn konkretajn decidojn, realigotajn de ICNEM, la LOK proponas, ke la diskutoj post ĉiu prelego kaj la ĝenerala diskuto okazu en jena diskuta kadro pri ĉiuj temoj: *La Aktuala kaj Potenciala Rolo de la Internacia Lingvo kaj la Rolo de ICNEM kaj de Aliaj Esperanto-Organizaĵoj kaj Instancoj Uzantaj la Internacian Lingvon*.

Inter la aliaj eroj de la programo estas ĉefkunveno de ICNEM kaj ĉefkunveno de IEAJ (Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj).

LA ORGANIZA KOMITATO

H.V. Rasmussen
prezidanto

KOTIZOJ KAJ PAGMANIEROJ

Kvankam ICNEM ne celas fariĝi amasa organizaĵo, ĝi volonte akceptas multajn membrojn, kiuj per sia morala subteno kaj per siaj kotizoj kaj eventualaj donacoj grave helpas ĝin plenumi sian taskon. Al la aliĝantoj ni ĉisube ripetas la informojn pri kotizoj de aktivaj membroj kaj pri pagmanieroj.

Laŭ art. 5.1.4 de la Statuto de ICNEM la jara kotizo de aktiva membro estas 50 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Ĉar la Centro ekfunkciis la 1-an de aŭgusto 1980, la unua kotiza jaro komenciĝis tiun daton kaj daŭros ĝis la 31-a de julio 1981. La kotizo inkluzivas abonon de *Horizonto* ekde januaro 1981.

Estas nepraktike havi la menciitan kotizan jaron, kiam la abona periodo de *Horizonto* estas la kalendarajaro, kiu estu ankaŭ la kontada jaro. Por unuecigi la periodojn, sur la aliĝiloj estas proponite, ke la aliĝantoj pagu 70 svisajn frankojn aŭ 240 danajn kronojn por la tuta periodo de la 1-a de aŭgusto 1980 ĝis la 31-a de decembro 1981.

Nun, ĉar la jaro 1980 estas pasinta, ekzistas tria ebleco: aliĝi kun efiko de la 1-a de januaro 1981 kaj pagi 50 sv.fr. aŭ 170 dkr. por la kalendarajaro 1981.

Resume: aliĝantoj povas pagi

aŭ 1) 50 sv.fr. aŭ 170 dkr. por la jaro de la 1-a de aŭgusto 1980 ĝis la 31-a de julio 1981,

aŭ 2) 70 sv.fr. aŭ 240 dkr. por la periodo de la 1-a de aŭgusto 1980 ĝis la 31-a de decembro 1981,

aŭ 3) 50 sv.fr. aŭ 170 dkr. por la kalendarajaro 1981.

Fondintoj bonvolu atenti, ke ili laŭ art. 5.1.1 de la Statuto devas pagi kotizojn kiel aktivaj membroj. Al ili ekzistas do nur la supre menciitaj eblecoj 1) kaj 2).

Kotizojn kaj donacojn bonvolu pagi per poŝtmandato (eventuale ĉeko) al *Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado*, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio, aŭ per poŝtĉeko al la poŝtĉekkonto de ICNEM:Kopenhago 1 19 06 01. Vidu cetere la antaŭlastan kovrilpaĝon.

H.V. Rasmussen,
Sekretario-kasisto
de ICNEM.

FONDUSO HORIZONTO

En la antaŭa numero (p.24) ni informis pri donacoj por *Horizonto* ricevataj en Strasburgo kaj poste dum 1980. Al tio ni povas nun aldoni, ke la sumo de la donacoj dum la tuta jaro superis la elspagojn por produkti kaj dissendi la revuon. La diferenco estis 1.870,64 dkr., kiun sumon la antaŭa redaktoro kaj administranto, f-ino *Inés Gastón*, transpagis al ICNEM.

Ĉar la menciitaj donacoj estis "orelmarkitaj" por *Horizonto*, la transpagita sumo estas nun plu rezervita por la revuo en aparta konto, *Fonduso Horizonto*. Postaj donacoj, kiujn la donantoj destinas ekskluzive por subteno al la revuo, estos same traktotaj.

H.V. Rasmussen.



INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Koresponda adreso: S-ro cand.oecon. H.V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

FONDO KAJ CELOJ

Dum la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Strasburgo en 1980, estis fondita la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM).

Unu el la celoj de la Centro estas manifesti kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi la tradiciajn kulturajn kaj ĝenerale ideajn valorojn de la partipolitike kaj religie neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro kunordigas la laboron de ĉiuj neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj deziras tion. Ĝi kreas financon bazon por certigi aperadon de *Horizonto* kaj de aliaj publikaĵoj, kies linio konformas al la celoj de la Centro kaj al la Deklaro de Principoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro tute ne celas fariĝi amasa Esperanto-organizaĵo aŭ konkurenci al kiu ajn Esperanto-societo. Tial ĝi havos nur limigitan nombron da ordinaraj membroj.

MEMBRECO

Kiel ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu parolas la Internacian Lingvon kaj ĉiu Esperanto-organizaĵo, kiu agas konforme al art. 2 de la Statuto. Krome fizikaj kaj juraj personoj povas esti akceptitaj kiel neordinaraj membroj. Informoj pri membrokategorioj kaj iliaj kontribuoj kaj kotizoj troviĝas en la sube menciitaj broŝuro kaj aliĝilo.

PLENUMA KOMITATO

En Strasburgo estis elektita la unua, provizora Plenuma Komitato, kies ĉefa tasko estas ekfunkciigi la Centron, kaj kiu konsistas el:

Prezidanto Prof. D-ro IVO LAPENNA, 77 Grasmere Avenue, Wembley,
HA 9 8TF, Middlesex, Britio.

Vicprezidantoj D-ro KLAUS PERKO, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.
S-ro JEAN THIERRY, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio.
F-ino MARIANNE VERMAAS, Nieuwe Binnenweg 70, I,R, 3015 BC
Rotterdam, Nederlando.

Sekretario-kasisto S-ro H.V. RASMUSSEN, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

LA CENTRO KAJ HORIZONTO

Ĉiuj membroj de la Centro ricevadas senpage la revuon *Horizonto*, sed tiu periodaĵo, eldonata de la Eldonejo Perspektivo, estas ankaŭ aparte abonebla rekte ĉe la eldonejo aŭ pere de la perantoj, kies nomoj kaj adresoj aperas sur la dua kovrilpaĝo.

ALIĜILOJ KAJ PAGOJ

Apartan broŝuron kun la Statuto de la Centro, Deklaro de Principoj, Rezolucio de la Konferenco de Ateno, ĉiujn aliajn informojn kaj aliĝilon bonvolu havigi ĉe la sekretario-kasisto. Li akceptas la aliĝojn kaj kotizojn (postĉeka konto de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado: Kopenhago 1 19 06 01). Bonvolu atenti: Se por iu deziranta aliĝi estas pli facile pagi al la prezidanto aŭ al unu el la vicprezidantoj, li/ŝi povas pagi la kotizon ankaŭ tiamaniere, kaj la koncerna funkciulo de la Centro ordigos tion kun la sekretario-kasisto.

VERKOJ DE IVO LAPENNA

Verkitaj en la Internacia Lingvo.

*Ĉiuj inspiritaj de humaneca
internaciismo.*

Ĉiuj verkitaj en **modela Esperanto**.



RETORIKO, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5.500 ekzempleroj disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 8 anglaj pundoj, 80 danaj kronoj aŭ egalvaloro, 2-a eldono, bindita, nur 6 anglaj pundoj aŭ 60 danaj kronoj (nur kelkaj ekzempleroj).

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ, komplemento de *Retoriko*, 152p., fortike broŝurita, prezo 5 anglaj pundoj, 50 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO, polularscienca kaj interesa por ĉiu klera persono, broŝurita, prezo 3 anglaj pundoj, 30 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (ĉefaŭtoro kaj ĉefredaktoro), monumenta, reklamata de UEA kiel "enciklopedio de la nuna tempo", tamen ne komplete sen *Hamburgo en Retrospektivo*, bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indeksoj, prezo 84 ned. gld., 215 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO, konsiderinde kompletigita eldono, lukse broŝurita, 152 p., prezo 5 anglaj pundoj, 50 danaj kronoj, 18 germanaj markoj, 40 fr.fr., 650 pesetoj aŭ egalvaloro.

Prezoj ekde la 1-a de junio 1979. Ĉiuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 x 14 cm.

Mendeblaj ĉe nia **LIBROSERVO de NEM**, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando. Kun ecepto de *Esperanto en Perspektivo*, la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la *aŭtoro*: 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj.

Krome, unuopaj ekzempleroj de *Hamburgo en Retrospektivo* estas mendeblaj ĉe s-ro *Jean Thierry*, 5, rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio, aŭ ĉe bonaj libroservoj. Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe **ELDONEJO PERSPEKTIVO**, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando, kun jenaj rabatoj: 33% ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj plus 10% por afranko, 33% sen afranko ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

En ĉiuj aliaj kazoj bonvolu ĉiam aldoni 10% por la afranko.

LA SUPRAJ VERKOJ DE IVO LAPENNA estas pli aktualaj nuntempe ol iam antaŭe. Ili donas klaran, science bazitan eksplikon pri la esenco de la Internacia Lingvo (Esperanto), pri ĝia rolo en la hodiaŭaj kaj estontaj internaciaj rilatoj kaj pri ĝia monde solidariga funkcio. Samtempe, kune kun la artikoloj en *HORIZONTO*, ili estas la plej trafa respondo al la pseudosciencaj skribaĵoj de la sovetismaj ideologoj en la posthamburga UEA kaj ĝenerale en la Esperanto-Movado.

MENDU TUJ KAJ ATENTIGU VIAJN GEAMIKOJN

Helpu pluporti la torĉon de la *zamenhofa esperantismo*

LIBROSERVO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO,
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando.